WIKIPEDIA

Varaja lingvo

La **varaja lingvo** - varaje nomata *Wáray-Wáray, Winaray* aŭ *L(in)eyte-Samarnon*, en Esperanto foje ankaŭ nomata "varaj-varaja lingvo" - estas membro de la aŭstronezia lingvaro kaj unu el la indiĝenaj lingvoj de Filipinoj. Ĝi parolatas aparte sur la insuloj Samaro, Lejteo (aparte ties orienta parto) kaj Bilirano de la filipina insularo Bisajoj.

La lingvo apartenas al la familio de bisajaj lingvoj kaj distance parencas al la cebua lingvo.

varaja lingvo	
Wáray-Wáray, Winaray	
Parolata en	Filipinoj
Parolantoj	3 100 000
Denaskaj parolantoj	ĉ. 3 milionoj
Skribo	Latina skribo
Lingvistika klasifiko	
Aŭstronezia	
Malajopolinezia lingvaro	
Okcident-malajopolinezia lingvaro	
centra filipina lingvaro	
bisaja lingvaro	
centra bisaja lingvaro	
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	war
ISO 639-3	war
SIL	WRY
Glottolog	wara1300
Angla nomo	Waray
Franca nomo	waray-waray
Vikipedio	

Enhavo

Ekzemploj
- Nombroj
- Iuj tipaj vortoj kaj frazoj

Ortografio

Eksteraj ligiloj

Ekzemploj

Nombroj

La nombroj de 1 ĝis 10 estas uzataj en la varaja lingvo. Ekde 11 nuntempe preskaŭ ekskluzive uziĝas la nombroj de la hispana lingvo, ĉar la plejparto de la denaskaj varajlingvanoj pro manko de praktika uzo apenaŭ plu konas la korespondajn varajajn vortojn.

unu	usá
du	duhá
tri	tuló
kvar	upat
kvin	limá
ses	unom
sep	pitó
ok	waló
naŭ	siyám
dek	napúlô
dek unu	(napúlô kag usá)

Iuj tipaj vortoj kaj frazoj

Jen iuj tipaj vortoj kaj frazoj uzataj en la varaja lingvo:

- Bonan matenon (tagmezon/posttagmezon/vesperon) – *Maupay nga aga (udto/kulop/gab-i)*
- Ĉu vi komprenas la varajan? – *Nakakaintindi ka hit Winaray?*
- Saluton. – *Kumusta.*
- Dankon. – *Salamat.*
- Mi amas vin. – *Hinihigugma ko ikaw.* aŭ *Ginhihigugma ko ikaw.*
- De kie vi venas? – *Taga diin ka?*
- Kiom estas tio? – *Tag pira ini?*
- Mi ne komprenas (vin). – *Diri ako nakakaintindi.*
- kio – *ano*
- kiu – *hin-o*
- kie – *hain*
- kiam (estonto) – *san-o*
- kiam (pasinto) – *kakan-o*
- kial – *kay-ano*
- jes – *oo*
- ne – *dire*
- tie – *adto*
- nokto – *gab-i*
- tago – *adlaw*
- Ĉu mi povas helpi? – *Pwedi bumulig?*

Ortografio

Kvankam la nuntempe ne plu ekzistanta "Akademio de bisajaj lingvoj de Samaro kaj Lejtero" (*Sanghiran san Binisaya ha Samar ug Leyte*) kreis standardan ortografion por la varaja lingvo, tiu regularo ne tre disvastiĝis kaj uziĝis. Praktike ankoraŭ nuntempe ne ekzistas ĝenerale akceptita ortografio. Sekve povas ekzistis du skribformoj de sama vorto, kvankam la diferencoj kutime limiĝas je vokaloj. Ekzemploj estas

- *diri* aŭ *dire* („ne“)
- *hira* aŭ *hera* („al ili“)
- *pira* aŭ *pera* („mono“ - ankaŭ povas signifi "kiom da?"')
- *maopay* aŭ *maupay* („bone“)
- *guinhatag* aŭ *ginhatag* („donis“)
- *direcho* aŭ *diritso* („antaŭen“; el la hispana lingvo)

Eksteraj ligiloj

- ekzemple: la artikolo pri Esperanto en la varaja branĉo de vikipedio
- informo pri la varaja lingvo en la retejo *ethnologue.com* (angle) (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=war)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Varaja_lingvo&oldid=5804006"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:49, 30 nov. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.